



Linukso por Esperantistoj

Estas permesite kopii, disdoni kaj/aŭ modifi ĉi tiun dokumenton, sen Senŝanĝaj Sekcioj, sen Antaŭkovrilaj Tekstoj kaj sen Malantaŭkovrilaj Tekstoj, laŭ la kondiĉoj de la Permesilo GNU por Liberaj Dokumentoj, Versio 1.2 aŭ ajna pli nova versio eldonita de la [Free Software Foundation](#). Kopio de la permesilo estas inkluzivita en la sekcio "[GNU Free Documentation License](#)"

Averto: Mi kompilis la tekstojn esprimante kio estas Linukso kaj sia uzado el Vikipedio kaj aliaj reto-fontoj. Je la fino el ĉi-artikolo, la tekstofonto estas menciita.

Antaŭvortoj

Kelkjaroj antaŭe mi menciis al Renato Corsetti, mi volis aldoni al la Kostarika Movado

kopiojn el KD-oj kun Linuksa Mastrumsistemo. Ĉu vi scias pri ĝi? Linukso estas viruso-libera,

mi devas precizigi; vi devu scii ke dumtempe Vindozo havas egaj da virusaro, estas nur kiel

40 virusoj kiuj povu fari malbonaĵon en Linukso-komputilo, sed ĝi estas preskaŭ malverŝajne,

ĉar Linukso operas kun limigo pri uzado. Ekzemple, Microsofta emaila softvaro eblas infekti

komputilon kiam oni nur faras ion tiel saniga kaj senkulpa kiel legi retmesaĝojn. Anstataŭ,

Linuksa uzanto devu:

a) legi la mesaĝon,

b) savi la aneksaĵon en la disko,

c) doni al la aneksaĵo ekzekutemajn rajtojn, *(sen ili, oni me povas operi)

d) kaj poste lanĉi la ekzekutemaĵon.

Pli limigemaj paŝoj, malpli probable ke virusinfekto povas aperi. Oni operas la sistemon kun

du kontoj: uzanto kaj administristo. La uzantoj havas limigitan eniron, sed la administristo

povas instali aŭ malinstali programaron kaj adapti ĝin laŭ bezono aŭ volo. Defaŭlte, la disko

povas esti dividigita en du partoj (aŭ pli laŭbezzone): Radika apartigo por la administristo-

uzado (kie estas la programaro instaligita) kaj Hejma apartigo (kie estas la uzantoj-arĥivoj) Ĝi

faras la Linuksa sistema tre sekura ĉar estas pli malfacila perdisi la dokumentojn kaŭze de aĉa instalado aŭ akcidenta viŝado el arĥivoj.

Linukso kun nur unu KD-o vi povas tajpi en pli ol 60 lingvoj (ESPERANTO ankaŭ), uzi kiel 1200 diversaj printiloj, kaj instali pli ol 21000 liberaj programoj.

Ĉi tiaj estas la celoj el Linukso-komunumo:

- 1- ke programoj devus esti akireblaj sen ia kosto,
- 2- ke homoj rajtas uzi informadikajn ilojn en sia propra lingvo kaj sendepende de ia handikapo,
- 3- ke homoj rajtas libere modifi kaj adapti sian programaron laŭbezone.

Tiuj liberoj igas Linukson fundamente malsama ol la tradicia privata programaro (kiel Vindozo): oni ne nur povas akiri siajn bezonatajn ilojn sen ia kosto, sed oni ankaŭ povas ŝanĝi kaj modifi siajn programojn ĝis ili funkcios ĝuste kiel oni deziras.

Ankaŭ, se vi havas Linukso-KD-on, vi rajtas rekopi, disvastigi, ŝanĝi la mastrumfonton kaj publikigi vian plibonagaĵon, vendi kopiojn aŭ instali la sistemon en ĉiuj la komputiloj vi deziras.

Mi esperas ke ĉi-tiu verkaĵo povas esti utila por vi-ĉiuj.

Ricardo Herrera Trigueros

Kopiado el la Vikipedio

Por la [Esperanta Vikipedio](#) validas [GFDL](#), la Permesilo de [GNU](#) por Liberaj Dokumentoj. GFDL estas por dokumentoj tio, kio [GPL](#) estas por programoj. La celo de la Vikipedio estas krei libere alireblan informfonton en la formo de enciklopedio. Ĉiu uzanto rajtas libere kopii, modifi kaj distribui ajnajn partojn de la enhavo de Vikipedio, kondiĉe ke tiu uzanto:

donas al *siaj* uzantoj la samajn rajtojn sub la permesilo [GFDL](#) informas siajn uzantojn, ke Vikipedio estas uzita kiel fonto de la citaĵoj, kaj donas al siaj uzantoj aliron al la Vikipedia fonto mem (aŭ kiel ligilon, aŭ kiel kopion de la tuta vikiteksto).

Enhavo:

Linukso por Esperantistoj

Antaŭvortoj

Kopiado el la Vikipedio

Linukso

Debian

Ubuntu

Linukso kaj Vindozo: Advantaĝoj kaj malavantaĝoj

Libera programaro

La Difino de Libera Programaro

GNUa Ĝenerala Publika Permesilo

Linukso

Linukso (Linux) estas kerno de operaciumo, kiu estas retroprojektado de Unikso. En ofta uzado, "Linukso" temas pri kaj tiu kerno mem kaj la ĉirkaŭa programaro, inter ili la iloj de GNU, KDE, GNOME, Xfce, Openoffice.org, la Fenestra Sistemo X kaj multaj aliaj programoj. Pro tio, kelkaj, inter ili Richard Stallman kaj la projekto Debian, preferas nomi la tutan sistemon "GNU/Linux".

Enhavo

1 Historio

2 Tehnike

3 Distribuajtoj

4 Dosieraj Sistemoj

5 Komunumo

6 Vindozaj programoj en linukso

Historio

Verkita en 1991 de finna komputilstudento (Universitato de Helsinki) Linus Torvalds kiel hobia kaj disvastigita laŭ la permesilo GPL, Linukso ŝtopis la ĝistiaman truon en la libera operaciumo GNU: manko de kerno, la centra programo kiu regas ĉiun malaltnivelan operacion de komputilo (tamen la oficiala GNU-kerno estas Hurd). La versio 0.01 aperis en septembro 1991 kaj 0.02 en oktobro 1991. Tiel ekeblis, se vole, tradukiloj per nur libera programaro. Poste aliaj liberaj kernoj kaj operaciumoj ekestis, sed Linukso restas la plej uzata kaj plej fama.

Tehnike

Linukso akordas kun la uniks-normo Posikso, kaj plejparte rolas kiel kutima Unikso, kvankam ĝi ne devenas de la originala fonto de Bell Labs kiel la BSD-Uniksoj. Ĝi estas monolita kerno etendebla per moduloj.

Nuntempe Mikrosofto konsideras Linukson la ĉefa konkuranto kontraŭ ĝia operaciumo Vindozo.

Distribuaĵoj

La unua (historie) maniero por havi la tutan sistemon funkciantan estis havi la kodon de la programoj kaj kompili ĝin.

Sed ĉi tio povas esti granda problemo por homoj, kiuj ne povas konekti interreton, kiuj ne scias fari tion aŭ kiuj ne havas sufiĉan tempon. Por solvi tion ĉi, la plej ofta solvo estas ke iuj kolektas aron da programoj, kiujn ili opinias oportunaj, kaj ĝin vendas, disdonas per gazetoj aŭ permesas elŝuti ĝin. Tio nomatas 'distribuaĵo'.

Ekzistas multaj distribuaĵoj: Debiano, Knoppix, Mandriva, Red Hat, SUSE, ktp.

Dosieraj Sistemoj

Linukso toleras multajn dosierajn sistemojn:

minikso	ext	ext2	ext3 (portopunkta)	ext4 (portopunkta)	ReiserFS
(portopunkta)		JFS	XFS (portopunkta)	FAT	NTFS (portopunkta)

Portopunktado (ang. journaling) estas moderna maniero fari dosierajn sistemojn. Per portopunkteco oni povas eviti multajn erarojn sur la disko.

Komunumo

Ekzistas multaj asocioj pri linukso tra la mondo. Ĝenerale, oni nomas ilin "LUG" (Linuks-Uzantoj Grupoj) (angle: Linux Users Group). La celo estas disvastigi Linukson kaj la liberajn programojn pere de renkontiĝoj, instalado de Linukso, helpo al novuloj k.t.p. Multaj asocioj ekzistas en la reto pere de regionaj asocioj (vidu la vorton LUG en via lingvo). Ekzistas projekto por fondo de asocio "LUG-Esperanto" ĉe Projekto por LUG-Esperanto.

Vindozaj programoj en linukso

Multaj uzantoj de komputiloj alkiutimiĝas al vindozaj programaroj. Vindozaj programaroj ne rekte funkcias en linuksa sistemo. La plej simpla solvo estas

Wine, kiu estas libera, kaj la programoj Crossover Office (transigata oficejo) kaj Cedega. Tiuj programoj igas la vindaŝan programaron kompatibla per reimplementado de la Vindaŝa API en linukson. Multaj programaroj povas funkcii tiel rapide kiel en vindaŝo, kaj kelkfoje eĉ pli rapide. La fortaĵo de ĉi tia solvo estas, ke la programaroj ne devigas instaladegon de vindaŝo, kaj tial ankaŭ ne licenson. La malfortecoj estas, ke ĝi nuntempe ne estas 100%e kompatibla sistemo.

Alia ebleco estas Win4Lin, la komerca programaro kiu konvertigas la Vindaŝajn API-bibliotekojn tiamaniere ke ĝi funkcias sen reimplementado. Tio devigas ke Vindaŝo estu instalita, ne kiel operaciumo, sed kiel programaro en linukso. Tielmaniere vindaŝo funkcias fenestre kaj tra tiu fenestro funkcias ĉiuj vindaŝaj programaroj.

Tria alternativo estas virtuala maŝino, en kiu oni emulas tutan komputilon sub linukso. La malfortaĵo de emulado estas, ke oni riskas malpli rapidan sistemon. Oni ankaŭ devas instali vindaŝon. Vindaŝaj programoj, kiuj funkcias je ĉi tiu solvo, ne povas integriĝi sur la labortablo. Ekzemple oni ne povas kopii tekston el vindaŝa programaro al linuksa programaro aŭ inverse.

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Linukso>

Debiano

Debiano estas komunuo de disvolvistoj kaj uzantoj kies celo estas krei kaj manteni [operaciumon](#) de [GNU](#) bazita sur [libera programaro](#) antaŭkompilita en simpla formato por multaj maŝinoj kaj por multaj [kernoj](#). Debiano estas la bazo por multaj aliaj distribuaĵoj, inkluzive de [Knoppix](#), [Linspire](#) kaj [Ubuntu](#).

Ĝi estas disvolvata sendepende de la entreprenoj, kreata de la uzantoj mem, do ĝi estas sendependa de komercaj bezonoj. Debiano ne vendas sian programaron, sed permesas ke ĉiu senpage elŝutu ĝin de [interreto](#), tamen permesante pluendi ĝin.

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Debiano>

Ubuntu

Bonvenon en Ubuntu-linukson!

- "**Ubuntu**" estas antikva afrika vorto kiu signifas "bonkoreco por la aliaj". "Ubuntu" ankaŭ signifas "mi estas tio kio mi estas, pro tio kio ni ĉiuj estas". La Ubuntu-linuksa distribuo prenas la spiriton de "ubuntu" por la informadika mondo. Bedaŭrinde ankoraŭ la ttt-ejo www.ubuntulinux.org ne estas tradukebla, do en tiun ĉi viki-paĝon oni tradukas la tekston de la ĉefpaĝo de Ubuntu. Alie, ankoraŭ ne estas sufiĉaj personoj por krei "ubuntueo.org", tamen vi povas viziti tian paĝon en via lingvo por pripensi kia ĝi estus en Esperanto kaj, kompreneble, aliĝi por krei esperanto teamon.. Ubuntu estas plena linuksa mastrumsistemo, libere akirebla kun kaj komunuma kaj profesia subtenoj. La Ubuntu-komunumo estas konstruata sur la ideoj esprimitaj en la Ubuntu-Manifesto: ke programoj devus esti akireblaj sen ia kosto, ke homoj rajtas uzi informadikajn ilojn en sia propra lingvo kaj sendepende de ia handikapo, ke homoj rajtas libere modifi kaj adapti sian programaron laŭbezone. Tiuj liberoj igas Ubuntu-n fundamente malsama ol la tradicia privata programaro: oni ne nur povas akiri siajn bezonatajn ilojn sen ia kosto, sed oni ankaŭ povas ŝanĝi kaj modifi siajn programojn ĝis ili funkcios ĝuste kiel oni deziras.

Publikaj kompromitoj de Ubuntu-linukso

- La ubuntu teamo publike kompromitas sin kun la uzantoj en la jenaj terminoj: 1 Ubuntu ĉiam estos senkosta, kaj estos nenia pluskosto kontraŭ la "entreprena versio". Ni laboras por ĉiaj uzantoj (entreprenoj, individuoj, k.a.) en la samaj kondiĉoj. 2 Ubuntu inkluzivas la plej bonajn tradukojn kaj handikap-helpilojn troveblajn en la liber-programara komunumo, por igi Ubuntuon uzebla de kiel eble la plej granda nombro da honoj. 3 Ubuntu estas regulare kaj predikteble liberigata: nova finversio aperas ĉiun jarduonon. Oni povas uzi aŭ la stabilan aŭ la disvolvatan version. Ĉiu versio estas subtenataj de sekurecaj ĝisdatigoj dum almenaŭ 18 monatoj. 4

Ubuntu plene kompromitiĝas kun la principoj de libera kaj kodmalferma programaro, ni instigas homojn uzi liberajn programojn, kopii, modifi, plibonigi kaj disdoni ilin. Ubuntu utilas kaj por skribtabla kaj por servila uzoj. La nuna versio funkcias sur la jenaj arĥitekturoj: Intel x86, AMD64 (Hammer), kaj Power Pc (Apple iBook kaj Powerbook, G4 kaj G5). Ubuntu enhavas pli ol 16000 programojn kaj programerojn, sed en ordinara kodoromo estas loko por la baza instalado. Ĝi startas kun la kerno 2.6 kaj Gnome 2.10, kaj enhavas ĉiujn standardajn skribtablajn aplikaĵojn: inkluzive de tekstprilaborado, kalkulfolioj, interreto, e-poŝto, ttt-serviloj, programlingvoj kaj program-iloj, kaj kompreneble diversaj ludoj.

Teknika subportado

- Multaj kompanioj ĉirkaŭ la mondo ofertas teknikan subportadon por Ubuntu. Oni povas trovi liston ĉe Ubuntu marketplace. Notu ke ekzistas multaj subport-eblecoj, inkluzive de senkoste komunuma kaj komerca.

<https://wiki.ubuntu.com/EsperantoDocumentation>

Linukso kaj Vindozo

AVANTAĜOJ

* Uzi linukson estas senpage ;-))))

* Libereco: aliro al la fontkodo ebligas kopiadon, modifadon kaj lernadon. Vi havas la garantion ke programoj faras tion kion ili promesas. Vi mem povas engaĝiĝi en disvolvado de programo, se posedatas la fakaj konoj. La programoj estas porteblaj al pluraj komputilaj platformoj. Oni ne restas sub la premo de entrepreno kiu konstante devigas ke vi ŝanĝu vian sistemon, eĉ se ĝi jam faras ĉion kion vi bezonas. Malfermaj formatoj, kiuj ebligas pli bonan interfunkciadon. Kaj, tre grave por ni esperantistoj, oni povas libere traduki kaj adapti ilin... ;-) (jes, kaj ĝenerale sen bezono pri programadkonoj!)

* Sekureco: la arkitekturo de linuksa sistemo, kreita dekomence por uzado en retoj, estas multe pli fidinda. Precipe rilate al virusoj. En vindozo ĉiu uzanto rajtas detrui la sistemon, kio malfermas la pordon por virusoj, spionprogramojn, ktp. En linukso, la normalaj uzantoj nur uzas la sistemon; por (mal-)instaladoj, agordoŝanĝoj, ktp estas necese ŝanĝi al statuso de "administranto", por kio postulas pasvorto. Alia afero estas ke la plejmulto de spioniloj, virusoj, ktp estis kreitaj por vindozo... ;-))

* Alternativoj: por ĉiuj aferoj estas malsamaj alternativoj en linukso. Ĉu por tekstaj programoj, ĉu por interretaj, ĉu por la propra grafika interfacoj, ktp, ktp. Kaj tiu nombro eksponentiale kreskas.

* Multaj teknikaj solvoj superaj al tiuj de proprietaj programoj, rilate al la funkciado de la sistemo. Nu, estas miloj da programistoj laborantaj sur la kodoj; neniu entrepreno sukcesus pagi la salajron de tiom multaj programistoj.

* Ideologio: la ideo ke la kono estas havaĵo de la homaro, kaj ke iu ajn persono devas havi aliron al ĝi. Tiu estas la baza gvidlinio de la disvolvado de libera programaro. Kaj ke ni ĉiuj laboru kune.

Jen aliaj argumentoj, rilate al la ideologio:

<http://www.softwarelivre.org/whatisit.php>

(ene de la paĝaro PSL: Projeto Software Livre Brasil, tre rekomendinda portalo pri linukso kaj rilataĵoj)

MALAVANTAĜOJ

Aliflanke...

Mi devas ankaŭ mencii la malavantaĝojn/malfacilaĵojn, por ne kaŝi la veron ;-):

* Programoj faritaj por vindaĵo (la plejmulto) ĝenerale ne estas ruleblaj sub linukso (la esceptoj estas tiuj kiuj funkcias per emuliloj); se la entrepreno de la programo ne ofertas version por linukso aŭ se ne ekzistas similaĵo por linukso, foje oni ne havas solvon. [tamen por ĉiuj bazaj taskoj oni jam havas dekojn da programoj simulfunkciaj]

* En linukso ankoraŭ estas malmultaj ludoj kaj specialigitaj programoj (por specifaj fakaj celoj).

* La subteno al hardvaro ankoraŭ ne estas plena, ĉar multaj fabrikantoj liveras regilojn ("drajvojn") nur por vindaĵo (la fifamaj kodiskoj kiuj akompanas kartojn, ktp). Multo estas farata de volontuloj, kaj ĉiuj plej oftaj aferoj jam estas bone subtenataj.

* Foje, la tro multaj alternativoj konfuzas la malpli spertan uzanton.

* La agordado de linukso ĝenerale estas pli malfacila, ĉar iom "malcentreca".

Ankaŭ la fakto ke linukso estas reta mastruma sistemo kontribuas al tio. Ĝenerale estas necesaj pli profundaj komputikaj konoj por solvi la malglataĵojn.

* La distribuaĵoj sufiĉe diferencas inter si; ne ekzistas tiu ideo ke "ĉie vi renkontos la saman aferon", kio postulas foje iaspecan lernadon. Eble en via hejmo vi uzos unu, kaj en laborejo alian distribuaĵon.

* Mankas normoj por kelkaj aferoj, por doni pli "koheran" vizaĝon al linukso. La bunteco de la programoj, opcioj, formatoj, agordoj, ktp, el kiuj multaj sekvas siajn proprajn ideojn, kreas ian senton de "kaoso". Ĝuste tion klopodas solvi la distribuaĵoj, meti ordon al la kaoso (estas pli malpli la samo kio okazas rilate al ne multe uzataj vortoj en Esperanto: ĉiu uzas la sian, proponas neologismon, ktp; nur la forto de la uzado aŭ la Akademio solvas tian problemon). Sed neniu rajtas devigi ion ajn, ĝuste pro la libereco. Do, la solvo ĉi tie estas ĝuste tiuj formatoj kiuj fariĝas la plej uzataj, agnoskataj kiel la plej bonaj. Estas kvazaŭ la teorio de evoluado ;-)

* Linuksaj programoj estas ordinare ankoraŭ pli pezaj ol tiuj plene egalfunkciaj de vindaĵo, sed aliflanke ĝenerale pli stabilaj (sed tio ne signifas ke vi ne trovos programojn sub linukso malpli pezajn, eĉ se kun malpli da funkcioj: vi havas alternativojn, kaj ne nepre vi devas uzi la plej novan version de la programoj, kun la funkcioj X Y Z W ktp kiujn vi neniam uzos kaj nur pezigas la programon. Tio estas unu el miaj plej grandaj plendoj kontraŭ vindaĵo, kie vi estas ofte devigata aktualigi la programojn por plu uzi ilin (ekz, la interretajn mesaĝilojn). Alia menciinda fakto estas ke en mia komputilo mi nur sukcesas glate ruli divx-filmojn per linukso; mi bone spektas ekzemple Matrix Reloaded (plena je ago, rapidaj movoj, ktp) en mia praa pentium 233mhz # :-O , kio en vindaĵo ne funkcias...).

<http://jimes.multiply.com/journal/item/16>

Libera programaro

Libera Programaro (angle "Free Software") estas softvara movado kiu celas krei libere distribueblajn kaj ŝanĝeblajn programojn. La iniciatinto estas [Richard Stallmann](#), kiu fondis organizon [FSF](#) por antaŭenigi ĝin. Ili promesas al ni ke Libera Programaro konservas kvar liberaĵojn:

Libera programaro estas afero pri la libereco de uzantoj por uzi, kopii, disdoni, studi, ŝanĝi kaj plibonigi la programaron. Pli precize, ĝi aludas al kvar specoj de libereco, por la uzantoj de la programaro:

La libereco por uzi la programon, por iu ajn celo (libereco 0).

La libereco por studi kiel la programo funkcias, kaj ŝanĝi ĝin por viaj bezonoj (libereco 1). Atingo al la programfonto estas antaŭkondiĉo por tio ĉi.

La libereco por disdoni kopiojn, do vi povas helpi vian najbaron (libereco 2).

La libereco por plibonigi la programon, kaj disdoni viajn plibonigojn al la publiko, por helpi ĉiujn (libereco 3). Atingo al la programfonto estas antaŭkondiĉo por tio ĉi.

Historio

Ĉi tiuj liberecoj estis ekde la komenco de la 1960-aj jaroj ĝis la 1980-aj jaroj la regulo en komputiko, me la escepto. Eĉ la kodo de iuj [Operaciumoj](#) estis havebla senpage, kaj kun la rajto ŝanĝi kio estis malimplicite skribata. Neniu firmao aĉetus komputilon - ili kostis tiam pli ol 20 jaran salajron - akceptante dependon de unu sola fabrikanto.

Ekzemplo

Por ilustrati la principon de la Libera Programaro, kontraŭe al la mallibera programado, oni povas kompari ĝin kun kuirarta recepto :

laŭ la principo de la Libera Programaro: vi ricevis ĉi tiun recepton per iu ajn

kielo (magazino, amiko), kaj neniu povas malebligi al vi uzi la recepton. Vi rajtas redoni ĉi tiun recepton tiel kiel vi volas, same vi rajtas aliigi aŭ pludoni ĝin.

laŭ la principo de la mallibera programaro: vi devas akiri la pretan manĝaĵon kaj nur vi rajtas manĝi ĝin. Eĉ se vi scias la recepton, me estas permesate aliigi ĝin.

Laŭ la sama ideo, oni parolas pri "libera enhavo" por dokumento, kies enhavo estas libere videbla kaj kopiebla, kaj iafoje aliigebla per ĉiu, kiel en [Vikipedio](#).

La modelo de la libera programaro malkovriĝis en la 1990-aj jaroj, per ([GNU](#))/[Linukso](#).

http://eo.wikipedia.org/wiki/Libera_programaro

La Difino de Libera Programaro

Ni bontenas ĉi tiun difinon pri libera programaro por klare montri kiuj kriterioj devas esti plenumitaj por ke programaro estu konsiderita libera programaro.

`Libera programaro', traduko de la angla termo `Free software', vere koncernas liberecon, me prezon. Por bone kompreni la koncepton, vi devas pensi pri `libereco', me pri `senpageco'.

Libera programaro temas pri la libereco de la uzantoj ruli, kopii, disdoni, studi, ŝanĝi kaj plibonigi la programaron. Pli precize, ĝi signifas kvar tipojn da libereco por la uzanto:

1. La libereco ruli la programaron, por iu ajn celo (libereco 0).
2. La libereco studi kiel la programaro funkcias kaj ĝustigi ĝin laŭdezire (libereco 1). La ebleco akiri la programarofonto necesas por ĉi tio.
3. La libereco disdoni kopiojn de la programaro por helpi viajn kunulojn (libereco 2).
4. La libereco plibonigi la programaron kaj publikigi viajn plibonigojn por la profito de la tuta komunumo (libereco 3). La ebleco akiri la programarofonton estas antaŭkondiĉo por ĉi tio.

Programaro estas libera se uzantoj havas ĉiujn tiujn liberecojn. Tial, vi devus esti libera disdoni kopiojn, kun aŭ sen ŝanĝoj, senpage aŭ prenante pagon por la distribuo, al [ĉiuj ĉie](#). Havante ĉi tiujn liberecojn (inter alie) signifas ke vi me devas demandi aŭ pagi por permeso.

Vi ankaŭ devus havi la liberecon fari ŝanĝojn kaj uzi ilin private por via propra laboro aŭ amuziĝo, eĉ sen mencii ke tiujn ŝanĝojn ekzistas. Se vi publikigas viajn ŝanĝojn, vi me devus esti devigita sciigi iun ajn en iu ajna maniero.

La libereco uzi la programon signifas liberecon por iu ajn persono aŭ organizaĵo uzi ĝin sub iu ajn komputila sistemo, por iu ajn tipo de tasko, sen esti devigita komuniki kun la programulo nek kun iu ajn specifa institucio.

La libereco disdoni la programaron devas enhavi duuman aŭ ruleblan formon de la programaro kaj ankaŭ programofonton, sendepende de ĉu ĝi estas ŝanĝita aŭ neŝanĝita versio (disdoni programojn en rulebla formo estas bezonata por praktike instaleblaj liberaj operaciumoj). Estas akceptebla se me eblas krei duuman aŭ ruleblan formon de la programaro (ĉar kelkaj programlingvoj me permesas tiun), sed tiukaze vi devas havi la liberecon disdoni tiajn formojn se vi trovas aŭ programas rimedon por krei ilin.

Por ke la liberecoj fari ŝanĝojn kaj disdoni plibonigitajn versiojn estu sencohavaj, vi devas eble akiri fontan kodon de la programaro. Tial, akirebleco al la programofonto estas antaŭkondiĉo por libera programaro.

Por ke ĉi tiuj liberecoj estu veraj, ili devas esti nerevokeblaj tiom longe ke vi faras nenion malbonan; se la programulo de la programaro havas la povon revoki la permesilon, sen ke vi farus iun malbonan, la programaro me estas libera.

Tamen, certaj reguloj pri disdonado de libera programaro estas akcepteblaj, kondiĉe ke ili me konfliktas kun la ĉefaj liberecoj. Ekzemple, *copyleft* [Angle, tiu vorto estas vortludo kun la vorto *copyright*, kiu signifas "kopirajto". La vorto *right* ankaŭ signifas "dekstre" dum *left* signifas "maldekstre".] (simple klarigita) estas la regulo laŭ kiu kiam programaro estas pludisdonita, oni me eblas aldoni

malpermesojn por nei aliulojn la ĉefajn liberecojn. Ĉi tio me konflikta kun la ĉefaj liberecoj, ĝi ĝuste protektas ilin.

Eble vi pagis por ekhavi kopiojn de libera programaro, aŭ eble vi ekhavis ilin senpage. Sed sendepende de kiel vi ekhavis viajn kopiojn, vi ĉiam havas la liberecon kopii kaj ŝanĝi la programaron, eĉ [vendi kopiojn](#).

`Libera programaro' me signifas `nekomerca'. Libera programaro devas esti akirebla por komerca uzo, komerca evoluigo kaj komerca disdonado. Komerca evoluigo de libera programaro jam me estas nekutima; tia libera komerca programaro estas tre grava.

Reguloj pri kiel paki ŝanĝitan version estas akceptitaj, se ili me efektive blokas la liberecon eldoni ŝanĝitajn versiojn, aŭ la liberecon fari kaj uzi ŝanĝitajn versiojn malpublike. Reguloj laŭ kiuj `se vi igas vian version haveblan tiel, vi devas igi mian version havebla tiel ankaŭ' povas ankaŭ esti akceptitaj, same kondiĉe. (Rimarku, ke tia regulo tamen lasas al vi la eblecon decidi ĉu eldoni la programaron aŭ me.) Reguloj devigantaj eldonadon de fonta kodo al la uzantoj por versioj, kiujn vi publikigas, ankaŭ estas akcepteblaj. Ankaŭ estas akceptebla, ke la permesilo postuli ke, se vi disdonas ŝanĝitan version kaj pli frua programulo petas kopion de ĝi, vi sendu ĝin, aŭ ke vi identigu vin en viaj ŝanĝoj.

En la projekto GNU, ni uzas "copyleft" por protekti laŭleĝe ĉi tiujn liberecojn por ĉiuj. Sed ne-copylefta libera programaro ankaŭ ekzistas. Ni opinias, ke estas gravaj kialoj pro kiuj estas pli bone uzi copyleft, sed se via programaro estas necopyleftita libera programaro, ni tamen povas uzi ĝin.

Vidu Kategorioj de Libera Programaro_por priskribo pri ke kiel `libera programaro,' `copyleftita programaro' kaj kaj aliaj kategorioj de programaroj rilatas unu kun la alia.

Foje registaraj eksportodirektivoj kaj merkataj sankcioj povas limigi la liberecon disdoni kopiojn de la programaro internacie. Programuloj me havas la potencon senigi aŭ transpaŝi tiajn altrudojn, sed tio, kion ili povas kaj devas rifuzi estas imponi ilin kiel kondiĉoj por uzi la programaron. Tiel, la altrudoj me efikas je aktivaĵoj kaj personoj ekster la juĝrajto de tiuj registaroj

Ni me povas listigi ĉiuj la manieroj pere de kiuj tio povas okazi. Se kontraktobazita permesilo altrudas la uzanto je nekutima maniero tiel, kiel kopirajto bazitaj permesiloj me povas, kaj laŭ maniero, kiu me estas menciita tie kiel legitima, ni devos pensi pri tio, kaj ni certe devos konkludi, ke ĝi estas nelibera.

Parolante pri libera programaro, estas plej bone eviti uzi terminojn kiel `fordoni' aŭ `senpaga', ĉar tiuj terminoj implicas ke la afero temas pri tarifo, me pri libereco. Certaj kutimaj termoj kiel `kaperado' enhavas opiniojn, kiujn ni esperas ke vi me subtenos. Vidu Konfuzaj Vortoj kaj Frazoj kiujn indas eviti por diskuto de tiaj terminoj. Ni ankaŭ havas tradukojn de "libera programaro" en diversajn lingvojn.

Fine, rimarku ke kriterioj kiel tiuj klarigitaj en tiu difino de libera programaro postulas zorgan pripenson por sia interpretado. Por decidi ĉu specifa programara permesilo kvalifiĝas kiel liberprogramara permesilo, ni juĝas ĝin bazite sur ĉi tiuj kriterioj por decidi ĉu ĝi taŭgas laŭ la spiriton sed ankaŭ la precizajn vortojn. Se permesilo enhavas senkonsciajn restriktajn, ni rifuzas ĝin, eĉ se ni me anticipas sciis pri ĉi tiuj kriterioj. Kelkfoje permesilopostulo bezonas ampleksan pripenson, inkluzive diskutojn kun advokato, antaŭ ni povas decidi ĉu la postulo de la permesilo estas akceptebla. Kiam ni alvenis al konkludo pri nova problemo, ni ofte novigas ĉi tiujn kriteriojn por ke estu pli facile vidi kial certaj permesiloj kvalifikas aŭ me.

Se vi scivolas ĉu specifa permesilo kvalifikas kiel liberaprogramara permesilo, vidu nian [permesiloliston](#).

Se vi me trovas la permesilon tie, vi povas peti al ni pri tio sendante al ni retmesaĝon ĉe [<licensing@gnu.org>](mailto:licensing@gnu.org). Se vi konsideras verki novan permesilon, bonvolu kontakti la FSF, skribante al tiu retadreso. La plimultigado de malsamaj liberaprogramaraj permesiloj implicas pli da laboro por la uzantoj, por ke ili povu kompreni la permesilojn; ni certe kapablas helpi vin por trovi ekzistanta liberaprogramaran permesilon, kiu kongruas kun viaj bezonoj.

Se tiu me eblas, se vi vere bezonas novan permesilon, kun aŭ sen nia helpo vi povas certigi ĉu la permesilo vere estas liberaprogramara permesilo kaj eviti diversajn praktikajn problemojn.

Alia grupo komencis uzi la terminon "malfermita fonto" [Angle: *open source*] por signifi ion similan (sed malsaman) al "libera programaro". Ni preferas la terminon "libera programaro" ĉar, kiam vi ekscias ke ĝi temas pri libereco kaj me pri tarifo, [ĝi memorigas liberecon](#). La vorto "malfermita" neniam faras tion.

<http://www.gnu.org/philosophy/free-sw.eo.html>

GPL en Esperanto

1.1 El Vikipedio

(Alidirektita el [GPL/esperanto versio](#))

Avizo pri ĉi tiu traduko de la GNUa Ĝenerala Publika Permesilo. Ĉi tiu esperantigo de la «GNUa Ĝenerala publika permesilo» me estas oficiala. Ĝin me publikigis «Free Software Foundation» kaj ĝi me estas jura dokumento determinanta kondiĉojn por distribuado de programaro laŭ la «GNUa Ĝenerala Publika Permesilo» - nur la originala anglalingva teksto validas por tio. Tamen espereble la traduko helpas la Esperanto-parolantojn pli bone kompreni la enhavon de la «GNUa Ĝenerala publika permesilo».

La oficialan tekston de la GNUa at Ĝenerala Publika Permesilo vidu ĉe <http://www.gnu.org/copyleft/gpl.html>

Elangligis Sergio Pokrovskij.

GNU General Public License / GNUa Ĝenerala Publika Permesilo

Esperantigo de la versio 2 (Junio 1991)

Copyright © 1989, 1991, Free Software Foundation Inc. 59 Temple Place, Suite 330, Boston, MA 02111-1307 Usono

Ĉiu rajtas reprodukti kaj disvastigi neŝanĝitajn kopiojn de ĉi tiu Permesilo; sed ŝanĝi ĝin oni me rajtas.

1.2 Antaŭparolo

La pliparto de la permesiloj pri uzo de programo celas limigi vian liberon ĝin kunhavigi kaj modifi. Male, la GNUa Ĝenerala Publika Permesilo celas garantii vian liberon kunhavigi kaj modifi liberan programaron – certigi ke la programaro estu libera por ĉiuj uzantoj. Ĉi tiu Ĝenerala Publika Permesilo validas por pliparto da programaro de Free Software Foundation (la Fondaĵo de Libera programaro) kaj por multaj aliaj programoj kies aŭtoroj volas ĝin uzi. (Por alia parto de la programaro de Free Software Foundation validas, anstataŭe, «GNU Library General Public License», la GNUa Ĝenerala Publika Permesilo Biblioteka [1].) Ankaŭ vi povas apliki ĝin al viaj programoj.

Kiam ni parolas pri liberaj programoj, ja temas pri libero, me pri prezo. Niaj Ĝeneralaj Publikaj Permesiloj estas faritaj por disponigi al vi la liberon distribui [2] ekzemplerojn de liberaj programverkoj (kaj postuli pagon por ili, se vi volas);

ricevi la fontotekstojn aŭ povi preni ilin, se vi deziras;

modifi la programojn aŭ uzi pecojn el ili en novaj liberaj programoj;

kaj scii ke vi rajtas fari tiojn.

Por protekti viajn rajtojn ni devas enkonduki limigojn kiuj malebligu al iu ajn rifuzi al vi tiujn rajtojn aŭ proponi al vi cedi ilin. Tiuj limigoj esprimiĝas en certaj devigoj por vi, se vi distribuas ekzemplerojn de programo aŭ se vi modifas ilin.

Ekzemple, se vi distribuas ekzemplerojn de tia programo, ĉu senpage aŭ kontraŭ pago, vi devas pludoni al la ricevantoj ĉiujn rajtojn je ĝi, kiujn vi havas. Vi devas certigi ke ankaŭ la novaj posedantoj ricevu aŭ povu havigi al si la fontotekstojn.

Kaj vi devas informi ilin pri la kondiĉoj, por ke ili sciu siajn rajtojn.

Ni protektas viajn rajtojn en du paŝoj:

1. {ni} rezervas {al ni} la [aŭtorrajton](#) [3] je la programoj, kaj
2. ni disponigas al vi ĉi tiun Permesilon, kiu donas al vi juran eblon reprodukti [4], distribui kaj/aŭ modifi la programojn.

Krome, por protekti la aŭtorojn kaj nin mem, ni sciigas al ĉiuj ke estas nenia garantio pri la libera programaro. Personoj akirintaj programon modifitan per tria partio sciu, ke ili ricevis me la originalon, kaj tial la problemoj kaŭzitaj de tripartiaj ŝanĝoj me kompromitu la reputacion la originala aŭtoro.

Fine, ĉiun liberan programon konstante minacas programa patento [5]. Ni malvolas ke perantoj de libera programo individue akiru patenton je ĝi, per tio fakte farante la programon proprieta [6]. Por malebligi tion ni klarigis, ke patento estu koncesiita al ĉies ajn libera uzo – aŭ tute me estu koncesiita.

Nun sekvas la precizaj kondiĉoj pri reproduktado, distribuado kaj modifado.

La kondiĉoj pri reproduktado, distribuado kaj modifado laŭ la GNUa Ĝenerala Publika Permesilo

§0. Ĉi tiu Permesilo validas por ajna programo aŭ alia verko entenanta averton enmetitan de la posedanto de la aŭtorrajto, dirantan ke ĝi estas distribuebla laŭ la kondiĉoj de ĉi tiu Ĝenerala Publika Permesilo. Ĉi-sube «Programo» indikas ĉian tian programon aŭ verkon, kaj «verko bazita sur la Programo» estas aŭ la Programo mem, aŭ ia ajn derivita verko laŭ la difino de la leĝo pri la aŭtorrajto [7]: t.e. verko entenata la Programon aŭ ties pecon, ĉu modifitan aŭ me, kaj/aŭ tradukitan en alian lingvon. (Ĉi tie kaj sube la termino modifo kovras, senrezerve, tradukojn laŭ la plej ĝenerala senco.) Ĉi-sube vi indikas koncesiulon de la Permesilo.

Ĉi tiu Permesilo me koncernas realigon de la ceteraj rajtoj, aliaj ol reproduktado, distribuado kaj modifado. Rulado de la Programo me estas limigita, kaj ties eligaĵo

estas koncernata nur se ĝia enhavo konstituas verkon bazitan sur la Programo (alie ol pro la fakto ke ĝi estas rezulto de rulo de la Programo). Ĉu tio validas aŭ me, dependas de la funkcio de la Programo.

§1. Vi rajtas senŝanĝe reprodukti kaj distribui ekzemplerojn de la fontoteksto de la Programo tia kia vi ĝin ricevis, sur ajna datumportilo, kondiĉe ke ĉiu ekzemplero havu klare videblan kaj taŭgan avizon pri la aŭtorrajto (copyright notice) kaj malgarantiilon (disclaimer of warranty); ĉiuj avizoj pri ĉi tiu Permesilo kaj malgarantiiloj restas netuŝitaj; kun la ekzemplero de la Programo la akiranto ricevu kopion de ĉi tiu Permesilo. Vi rajtas fakturi la fizikan agon por liverado de ekzemplero de la Programo, kaj laŭvole vi rajtas oferti pagajn servojn garantiatajn.

§2. Vi rajtas modifi vian ekzemplerojn aŭ viajn ekzemplerojn de la Programo, aŭ ajnan ties pecon, tiel kreante verkon bazitan sur la Programo. Vi rajtas reprodukti kaj distribui ekzemplerojn de tia verko laŭ la reguloj de §1, se vi ankaŭ plenumas ĉiujn sekvajn kondiĉojn:

- a. la de vi modifitaj dosieroj enhavu bone videblan avizon ke vi ŝanĝis ilin, kaj la datojn de ĉiuj ŝanĝoj;
- b. distribuante aŭ publikigante ajnan verkon kiu tute aŭ parte entenas la Programon aŭ estas bazita sur la Programo aŭ ties parto, vi devas koncesii la rajtojn uzi tiun verkon al ĉiu tria partio laŭ la kondiĉoj de ĉi tiu Permesilo, sen ajna koncesia pago, kaj la verko estu koncesziata kiel unu tuto;
- c. se dum la normala uzmaniero de la modifita programo ĝi dialoge legas komandojn, vi devas zorgi ke ĝi, lanĉite en la plej kutima maniero por dialoga uzo, eligu anoncon kiu entenu:

avizon pri la aŭtorrajto;

malgarantiilon (aŭ male, informon ke vi provizas garantion);

permeson al la uzantoj plu distribui la Programon sub ĉi tiuj kondiĉoj, kaj indikon kiel la uzanto povas vidi kopion de ĉi tiu Permesilo.

(Escepto: se la Programo mem estas dialoga sed normale me eligas tian anoncon, tiam ankaŭ por via derivita verko tia anonco me estas deviga.)

Tiuj postuloj rilatas al la modifita verko konsiderata kiel unu tuto. Se apartigeblaj

komponentoj de la verko me estas derivitaj el la Programo, kaj sencas uzi ilin kiel sendependajn kaj apartajn verkojn, tiam ĉi tiu Permesilo me koncernas tiujn komponentojn en la okazoj kiam vi distribuas ilin kiel apartajn verkojn. Sed kiam vi distribuas tiujn samajn komponentojn kiel parton de tuto estanta verko bazita sur la Programo, tiam la distribuado de tiu tuto obeu la regulojn de ĉi tiu Permesilo, kaj la rajtoj akirataj de la pluaj koncesiuloj surbaze de ĉi tiu Permesilo etendiĝas ĝis la plena tuto, inklude ĉiujn ties partojn, sendepende tion, kiu aŭtoris ilin.

Do, la motivo de ĉi tiu §2 me estas akiri aŭ kontesti viajn la rajtojn je verko kiun vi aŭtoras; la celo estas realigi la rajton determini la manieron distribui la derivitajn aŭ kolektivajn verkojn bazitajn sur la Programo.

Simpla kunesto de alia verko, me bazita sur la Programo, apud la Programo (aŭ apud verko bazita sur la Programo) sur unu sama datumportilo memora aŭ distribua me etendas la kondiĉojn de ĉi tiu Permesilo sur tiun alian verkon.

§3. Vi rajtas reprodukti kaj distribui ekzemplerojn de la Programo (aŭ de verko bazita sur la Programo, laŭ §2) en celkodo aŭ en formo de plenumbla programo laŭ la reguloj de §§1 kaj 2 ĉi-supre, kondiĉe ke vi ankaŭ plenumas iun el la sekvaj postuloj:

- a. la ekzempleron akompanu la responda kompleta fontoteksto en komputile legebla formo, distribuenda laŭ la reguloj de §§1 kaj 2 ĉi-supre, sur datumportilo kutime uzata por interŝanĝi programaron; aŭ
- b. la ekzempleron akompanu skribita oferto, valida por almenaŭ 3 jaroj, disponigi al ajna tria partio, kontraŭ pago me pli granda ol via kosto de fizika transmeto, ekzempleron de kompleta responda komputile legebla fontoteksto distribuenda laŭ la reguloj de §§1 kaj 2 ĉi-supre, sur datumportilo kutime uzata por interŝanĝi programaron; aŭ
- c. la ekzempleron akompanu la de vi ricevita informo pri distribuado de la responda fontoteksto. (Tiu opcio validas nur okaze de nekomerca distribuado kaj nur se vi ricevis la programon en celkodo aŭ en formo de plenumbla programo, akompanitan de tia oferto laŭ §3.b de ĉi tiu Permesilo.)

La fontoteksto de verko estas tiu ĝia formo, kiu plej oportunas por modifado. La kompleta fontoteksto de plenumbla verko estas ĉiuj fontotekstoj de ĉiuj

komponentaj moduloj, plus ĉiuj dosieroj difinantaj interfacojn, plus la skriptoj uzataj por regi tradukadon kaj instaladon de la plenumbla programo. Tamen, per speciala escepto, en la distribuata fontoteksto povas foresti ĉio normale kundistribuata (ĉu en formo de fontoteksto aŭ kiel plenumbla programo) por la bazaj komponantoj (programlingva tradukilo, operaciuma kerno ktp) de la operaciumo per kiu ruliĝas la plenumbla programo – krom se tia komponanto mem apartenas al la plenumbla programo.

Se distribuado de la verko en formo de plenumbla programo aŭ celkodo okazas per atingebligo por kopiado el difinita loko, tiam disponigo de egala atingeblo por kopii fontotekston el la sama loko plenumas la postulon pri liverado de la fontoteksto, eĉ malgraŭ ke la tria partio me estas devigata kopii la fontotekston kun la celkodo.

§4. Vi me rajtas reprodukti, modifi, subkoncesii aŭ distribui la Programon alie ol laŭ la malimplicaj reguloj de ĉi tiu Permesilo. Ĉia provo alimaniere reprodukti, modifi, subkoncesii aŭ distribui la Programon estas nevalida kaj aŭtomate estingas ĉiujn viajn rajtojn donitajn per ĉi tiu Permesilo. Tamen la rajtoj de la partioj ricevintaj de vi ekzemplerojn de la Programo aŭ rajtojn laŭ ĉi tiu Permesilo plu validas, dum ili mem observas la kondiĉojn de la Permesilo.

§5. me estas postulate ke vi akceptu ĉi tiun Permesilon, ĉar vi ĝin me subskribis. Tamen nenio alia rajtigas vin modifi aŭ distribui la Programon aŭ verkojn el ĝi derivitajn. Tiajn agojn malpermesas la leĝo, krom se vi akceptas la Permesilon. Tial, se vi modifas aŭ distribuas ekzemplerojn de la Programo (aŭ de verko bazita sur la Programo), vi per tio indikas vian akcepton de la rajtigo per la Permesilo fari tion, kaj la akcepton de ĉiuj ĝiaj kondiĉoj kaj reguloj pri reprodukto, distribuado kaj modifado de la Programo aŭ de verkoj sur ĝi bazitaj.

§6. Ĉiufoje kiam vi pludistribuas la Programon (aŭ verkon bazitan sur la Programo), la ricevanto aŭtomate ricevas permeson reprodukti, distribui aŭ modifi la Programon laŭ la kondiĉoj kaj reguloj de ĉi tiu Permesilo. Vi me rajtas aldoni iajn ajn kromajn limigojn je la rajtoj de la ricevanto provizitaj per ĉi tiu Permesilo. Vi me responsas pri obeigo de triaj partioj al ĉi tiu Permesilo.

§7. Se, sekve de juĝa decido, aŭ de plendo pri rompo de patentaj rajtoj, aŭ pro

alia kaŭzo (ne nepre ligita al la patentaj juro), vi trafas sub devigon (ĉu per juĝa decido, kontrakto aŭ alie), kiu kontraŭas al la kondiĉoj de ĉi tiu Permesilo, tio me rajtigas vin malobei la kondiĉojn de ĉi tiu Permesilo. Se vi me povas distribui plenumante kaj la kondiĉojn de ĉi tiu Permesilo, kaj viajn aliajn koncernajn devigojn, tiam vi neniel povas ĝin distribui. Ekzemple, se patentaj permesilo malebligas al la subkoncesiuloj, akiritaj ekzemplerojn de la Programo rekte de vi aŭ per tria partio, ĝin senhonorarie pludistribui, tiam vi nur povas rezigni pri distribuado de la Programo.

Se iu postulo de ĉi tiu paragrafo iĝas nevalida aŭ neplenumebla ĉe estiĝo de iuj specialaj cirkonstancoj, aplikiĝu la resto de ĉi tiu paragrafo sen tiu postulo. Ĉi tiu paragrafo aplikiĝas plene {post la ĉeso de tia cirkonstanco aŭ} [8] se malestas tiaj cirkonstancoj.

me estas celo de ĉi tiu §7 instigi vin rompi patentojn aŭ aliajn pretendojn je proprieto aŭ kontesti validon de tiaj pretendoj; la sola celo estas protekti la integron de la sistemo de distribuado de libera programaro, sistemo funkcia per publikaj permesiloj. Multaj homoj malavare kontribuis al la kreo de riĉa gamo da programaro distribuata per tiu sistemo, fidante je ĝia konsekvenca aplikado; la rajto elekti la sistemon de distribuado de programverko apartenas al la aŭtoro / donanto, kaj me koncesiulo ĝin altrudu.

La intenco de ĉi tiu §7 estas klare prezenti, kiajn konsekvencojn celas estiĝi la ceteraj partoj de ĉi tiu Permesilo.

§8. Se distribuadon kaj/aŭ uzadon de la Programo en iuj landoj limigas patentoj aŭ interfacoj kovritaj per aŭtorrajto, la proponanto de la aŭtorrajto, metanta la Programon sub la kondiĉojn de ĉi tiu Permesilo, rajtas malimplice limigi la teritorion de distribuado de la Programo, ekskludante tiajn landojn, tiel ke la distribuado estu permesita nur en aŭ inter la landoj me tuŝitaj per tia limigo. En tia okazo la koncerna limigo estu rigardata kiel unu el la kondiĉoj de ĉi tiu Permesilo.

§9. Laŭbezone «Free Software Foundation» rajtas publikigi reviziitajn kaj/aŭ novajn versiojn de la Ĝenerala Publika Permesilo. Tiaj versioj konservos la bazajn principojn de ĉi tiu versio, sed povas diferencii en detaloj, responde al novaj problemoj aŭ situacioj.

Ĉiu versio ricevas sian propran numeron. Se la Programo indikas, ke ĝi estas submetita al ĉi tiu Permesilo en ties difinita versinúmero «aŭ ajna posta versio» («any later version»), tiam vi rajtas, laŭplaĉe, sekvi aŭ la kondiĉojn kaj regulojn de la indikita versio, aŭ tiujn de ajna pli malfrua versio publikigita de «Free Software Foundation». Se la Programo me indikas versinumeron, vi rajtas elekti iun ajn version iam ajn publikigitan de «Free Software Foundation».

§10. Se vi volas uzi partojn de la Programo en aliaj programoj, kies distribuaj kondiĉoj diferencas, skribe petu permeson de la aŭtoro. Por programaro kies aŭtorrajton tenas «Free Software Foundation», petu permeson de «Free Software Foundation»; iam ĝi faras esceptojn pri tio. La decidojn de «Free Software Foundation» motivas du celoj: konservi la liberon de ĉiu verko derivita el nia libera programaro, kaj – ĝenerale – helpi kunhavigon kaj reuzon de programaro.

1.3 Malgarantiilo

§11. Ĉar la Programo estas koncesiata senpage, al ĝi aplikiĝas neniam garantio, kiom tion permesas la koncerna leĝo. Krom se alio estas malimplice indikita en skriba formo, la tenantoj de la aŭtorrajto kaj/aŭ aliaj partioj disponigas la Programon «tia, kia ĝi estas» («as is») sen ia ajn garantio, nek esprimita nek implica, interalie sen la implica garantio pri surmerkatingeblo, aŭ taŭgeco por konkreta uzo. La tuta risko koncerne la kvaliton kaj funkcikapablon de la programo estas via. Se la programo montriĝos difekta, vi portos la kostojn de ĉiuj necesaj servoj, riparo aŭ korekto.

§12. Neniokaze, krom se alion postulas aplikebla leĝo aŭ skribita interkonsento, neniu tenanto de la aŭtorrajto aŭ alia partio rajtigita modifi kaj/ aŭ pludistribui la Programon laŭ la ĉi-supraj permesoj, me responsos al vi pro la damaĝoj, inklude ĝeneralajn, specialajn, akcidentajn aŭ malrektajn, rezultantaj el uzo aŭ maleblo uzi la Programon (interalie, perdon aŭ difekton de datumoj, aŭ perdojn suferitajn de vi aŭ de triaj partioj, aŭ nekapablo de la Programo kunlabori kun iuj ajn aliaj programoj) – eĉ se tiaj tenanto aŭ alia partio estis avertitaj pri la eblo de tiaj damaĝoj.

Fino de la reguloj kaj kondiĉoj

Aldono:

1.4 Kiel apliki tiujn regulojn al viaj novaj programoj

Se vi verkas novan programon kaj volas fari ĝin kiel eble plej uzebla por la socio, la plej bona maniero atingi tion estas fari ĝin libera, kaj tiam ĉiu povos ĝin pludistribui kaj modifi laŭ la kondiĉoj de ĉi tiu Permesilo.

Tiucele, aldonu al la programo la sekvajn avizojn. Plej sekure estas meti ilin komence de ĉiu fonta dosiero, por plej klare averti pri malesto de garantioj; kaj ĉiu dosiero enhavu almenaŭ la linion kun la aŭtorrajta signo kaj referencon al la plena teksto de la avizo:

<unu linio kun la nomo de la programo kaj resumo de ĝia funkcio>

Copyright © <jaro> <nomo la la aŭtoro>

Ĉi tiu verko estas libera programo; vi povas ĝin pludistribui kaj/aŭ modifi je la kondiĉoj de la GNUa Ĝenerala Publika Permesilo, eldonita de «Free Software Foundation», laŭ la versio 2 de tiu Permesilo aŭ, se vi preferas, ajna posta versio.

Ni distribuas ĉi tiun programon esperante ke ĝi estos utila, tamen SEN IA AJN GARANTIO, I.a. sen la implica garantio pri SURMEREKATIGEBLO aŭ TAŬGECO POR IU KONKRETA CELO. Pliajn detalojn vidu en la GNUa Ĝenerala Publika Permesilo. Ekzemplero de la GNUa Ĝenerala Publika Permesilo devas esti liverita al vi kun ĉi tiu programo; se vi ĝin me ricevis, turnu vin al

Free SoftwareFoundation, Inc.,

59 Temple Place, Suite 330,

Boston, MA 02111-1307

USA

Krome, indiku kiel eblas vin kontakti per la reta aŭ papera poŝto.

Se la programo estas dialoga, zorgu ke ĝi eligu mallongan avizon, kiel la ĉi-suba ekzemplo, ĉe startigo en la interaga reĝimo:

Gnomovido, versio 69. Aŭtorrajto © <jaro> <aŭtoronomo>

Gnomovido estas distribuata SEN IA AJN GARANTIO;

por vidigi detalojn tajpu «show w».

Tio estas libera programo, kaj bonvenas ĝia distribuado laŭ certaj kondiĉoj; por vidigi detalojn tajpu «show c».

La proponitaj komandoj «show w» kaj «show c» devus surekranigi la koncernajn partojn de la Ĝenerala Publika Permesilo. Kompreneble, ili povas havi aliajn nomojn; ili eĉ povas esti musklakoj aŭ menueroj – io ajn konvena al via programo. Se necesas, vi devas ankaŭ ricevi de via dunganto (se vi estas dungita programisto) aŭ eventuale de reprezentanto de via lernejo [9] skriban malpretendon je la aŭtorrajto. Vi povas uzi ĉi-suban modelon, konvene ŝanĝinte la nomojn:

La firmao «ABCĈ» per ĉi tio rezignas pri ĉiaj proprietaj rajtoj je la programo «Gnomovido» (faranta pasaĝojn por tradukiloj) verkita de Pro Gramisto.

<subskribo de Mag Nato>, la 1an de aprilo 3001 Mag Nato, Prezidanto

Ĉi tiu Ĝenerala Publika Permesilo malebligas inkludigi vian programon en proprietan programaron. Se via programo estas biblioteko da subprogramoj, vi eble juĝos pli utila permesi bindi proprietajn aplikaĵojn kun la biblioteko. Se vi volas tion, anstataŭ ĉi tiun Permesilon uzu la GNUan Ĝeneralan Publikan Permesilon Bibliotekan.

1.5 Notoj de la tradukinto

[1] Lastatempe FSF preferas nomi tiun permesilon me «biblioteka» sed «malplia» aŭ «reduktita» (GNU Lesser General Public License); ĉe tio la angla siglo restas la sama (LGPL).

[2] Distribui programon: disponigi atingon al ekzemplero de programo en ajna formo por reproduktado [4], interalie per la Reto, vendo, ludono, pruntedono ktp.

[3] Anglalingve temas pri «copyright», kaj «kopirajto» ja ekzistas en Esperanto; tamen la termino «aŭtorrajto» ŝajnas iom preferata. – La angla teksto estas iom malklara: kiu iĝas la tenanto de la aŭtorrajto, ĉu nepre FSF aŭ eventuale iu alia, ekz-e la aŭtoro mem? La gramatiko de ĉi tiu loko pensigas ke temas pri transdono de la aŭtorrajto al FSF; sed en la postaj rekomendoj ni vidas modelan ekzemplon

Gnomovido, versio 69. Aŭtorrajto © <jaro> <aŭtoronomo>

Aŭ eble «ni» estas me FSF sed «oni»?

[4] La originalo ĉiam parolas pri «copying», tamen en la aŭtorrajta juro la jura termino estas «reprodukti»: Reproduktado de programo estas farado de unu aŭ pli ol unu ekzempleroj de la programo sur ajna datumportilo, inklude registradon de la programo en komputilan memoron.

[5] La Usona juro ebligas patentojn certajn programojn (Software Patents).

[6] Proprieta rajto je programo estas la ekskluziva rajto plenumi kaj/aŭ permesi plenumi la sekvajn agojn:

publikigi programon;

reprodukti programon, plene aŭ parte, en ajna formo;

distribui la programon;

modifi la programon (inklude tradukon en aliajn lingvojn);

kaj aliajn agojn menciitajn en la koncerna leĝo.

[7] «derivative work under copyright law», termino de la Usona leĝo.

[8] La teksto intervinkula en la originalo malestas, sed estus memtrudiĝanta en la responda teksto rusa (kaj enestas en la rusa traduko).

[9] Postulo de Usona leĝo. Sed ekz-e en Ruslando nur la dunganto povas aŭtomate ricevi la aŭtorrajton je via verko, kaj nur je verko ofice komisiita al vi (krom se la dunga kontrakto antaŭvidis alion).

1.6 Tradukproblemoj

Ĉi tio estas mia unua teksto jura, kaj super ĉio la originalo estas en fremda lingvo. Pri la senco de kelkaj lokoj mi havas dubojn.

En §11

The entire risk as to the quality and PERFORMANCE of the program is with you. La tuta risko koncerne la kvaliton kaj FUNKCIKAPABLON de la programo estas via.

{Normale PERFORMANCE signifus «rendimento», sed la kunteksto ŝajnas postuli funkcikapablon, kiel en la traduko germana (Leistungsfähigkeit); cetere mi atendus ĝin unualoke, kaj nur poste zorgus pri kvalito.}

En §12

including any GENERAL, SPECIAL, INCIDENTAL OR CONSEQUENTIAL damages

damaĝoj, inklude ĜENERALAJN, SPECIALAJN, AKCIDENTAJN aŭ MALREKTAJN {Mi tradukis «laŭvorte», sen bone kompreni kio estas tiuj «specialaj damaĝoj» ktp; la rusa traduko ĉi tie parolas pri «ĝeneralaj (ĉu sumaj?), realaj, antaŭvideblaj kaj malrektaj damaĝoj»; la germana traduko, pri «allgemeiner oder spezieller Schäden, Schäden durch Nebeneffekte (Nebenwirkungen) oder Folgeschäden»; la ceteraj tradukoj, same papage kiel mi.}

(garantio pri) surmerkatigeblo

tiel mi tradukis «merchantability». En la germana traduko, «Marktreife»; ruse, proksimume, «var/ec/o, var/esto, var/statuso»; France «commercialisation».

http://eo.wikipedia.org/wiki/GPL/esperanto_versio

Biografioj

Linus Benedict TORVALDS [Linus Benedikt Turvalds] (naskiĝis 1969) estas finna komputilsciencisto loĝanta en Usono. Li estas fama unuarange pro tio, ke li iniciatis la kernon de la mastruma sistemo Linukso (Linux), kiun li kreis en 1991 kiel studanto ĉe la Universitato de Helsinko. Li magistriĝis en 1996 en la sama universitato, kiu jam en 2000 atribuis al honoran doktorecon.

Li ankoraŭ gvidas kaj ordigas la laboron pri Linukso (kiel "bonvola diktatoro"), sed nun multaj aliaj personoj kontribuas al la kerno.

En 1997 Torvalds transloĝiĝis al Silicia Valo en Kalifornio, Usono, kie li eklaboris ĉe la kompanio Transmeta. En 2003 li forlasis Transmeta-n por dediĉi sian tempon plene al la Linuksa kerno.

Kvankam Torvalds estas de Finnlando, kaj rigardas sin kiel finnon, lia denaska lingvo estas la sveda.

La persona bonŝanco-pupo de Torvalds estas la pingveno Tux, kiu estas modelo por la vaste uzata simbolo de Linukso en ties uzanto-komunumo.

http://eo.wikipedia.org/wiki/Linus_Torvalds

Richard Stallmann

Richard STALLMAN [RIĉard STALman] (naskiĝis la 16-a de marto 1953) estas la kreinto de la Emaksa tekstredaktilo, GCC, GPL, la Free Software Foundation, la League for Programming Freedom kaj la GNUa Projekto. Li estas unu el la plej vaste konataj proponantoj de la Libera Programara Movado. Li emfazas ties etikan aspekton.

La filozofio, kiu subtenas la Vikipedion, fluas el liaj ideoj pri la libereco de informo kaj intelekta verko.

Politike li draste kontraŭas al George W. Bush, Irakmilito, kaj Patriot Act, kaj simpatias al Hugo Chávez.

http://eo.wikipedia.org/wiki/Richard_Stallman